


esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 6 / 2013



Esperanto Vojaĝanto

Mondmuziko

Kiu interesiĝas pri fremdaj lingvoj, ŝatas fremdajn kulturojn kaj ĝuas fremdajn sonojn, tiu certe ankaŭ ŝatas fremdan muzikon resp. muzikon kiu enhavas fremdajn elementojn. Tiu intereso pri fremda resp. alilanda muziko povas jam komenciĝi ĉe la muziko de la najbaraj landoj. La aŭstra-hungara regno estis vere multetna ŝtato kaj tial la kultura diverseco estis tre granda.



Oni aŭdis en la orienta parto la judan Klezmer-muzikon, la tipan hungaran muzikon kiel Csárdás aŭ blovmuzikon el Bohemio. Lertaj komponistoj kiel Johann Strauß en siaj komponaĵoj uzis tiujn muzikajn elementojn kaj tial Vieno fariĝis la urbo en kiu kunfandiĝis multaj muzikaj elementoj kaj tio akcelis la evoluon de la muziko.

Tiaj kunfandiĝoj ankaŭ hodiaŭ okazas. La estas nur ke hodiaŭ tio okazas je tutmonda nivelo. Oni nomas la rezulton el tio "Mondmuziko" resp. "mondaj muzikoj", ĉar ja ne temas pri io unueca aŭ eĉ uniforma, sed tiu termino priskribas la fenomenon de tutmondeco en la muziko. Unuflanke nome estas la diversaj aŭtoroj, muzikistoj kaj kantistoj kiuj ekz. kantas originalajn kanzonojn el la propra lando laŭ la propra stilo kiel ekz. Cesaria Evora de la Kaboverdaj Insuloj.



Aliflanke ekzistas la eŭropa kaj nordamerika moderna populara muziko kiu prenas muzikajn elementojn el la tuta mondo kaj enplektas ilin en siajn proprajn verkojn.



Ni bohemie brilu plu



Tiu fenomeno ekestis en la 1960-aj jaroj. Mi rememoras ke kiam mi estis junulo, George Harrison de la tiam famega popgrupo "The Beatles" pasigis restadon en Hindio/Barato kaj entuziasmiĝis pri la muziko ludata per la tipe hinda kordinstrumento - la sitaro.



Post tio multaj popkanzonoj de Beatles enhavis tiun novan muzikan elementon. Ankaŭ usonaj popmuzikistoj transprenis muzikajn elementojn el aliaj landoj, ekz. el Brazilo. Nuntempe la "Mondmuziko" jam estas pli ol nur niĉo en la muzikmerkato, sed ekzistas specialaj vendejoj kiuj vendas produktojn el ekstereŭropaj evoluantaj landoj kaj tie oni bone povas aĉeti kompaktdiskojn kiuj kontentigas la guston de ŝatantoj de fremda muziko.



Kompreneble ankaŭ Esperanto povas ludi rolon en tiu transetna monda muziko. Pere de Esperanto tio kio estas fremda povas fariĝi parto de nia kultura posedaĵo. Tiel la mondaj muzikoj kaj Esperanto povas feliĉigi nin.


La temo de kultura diverseco estas tiel vasta ke eblos verki multajn sonartikolojn. Eble vi havas ion kion vi povus kontribui. La mondo estas bunta. Partoprenu en ĝi!

Tiu artikolo estas aŭskultebla ĉe :
Esperanta Retaradio
<http://peranto.posterous.com/>



K O L O F O N O

38a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>
Prezidanto : Angelos Tsirimokos prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
Sekretario : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG** : www.esperantobruselo.org
Abona membriĝo : 10 aŭ 13 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
Kunvenejo : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo



A G E N D O

Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org

Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede en nia kunvenejo en la konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono,
 Rue Van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo.

Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,
 bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981

NOVEMBRO

Sabato la 23a

9:00 - 16:30

KUPRO - KUrso por PROgresantoj (Wavre)André DEMARQUE ademarque@skynet.be (Tel : 0486 51 60 85).

Merkredo la 27a

18:30 - 20:00

Prelego de DAVID TREMBLA pri Eŭska lingvo

DECEMBRO

Merkredo la 18a

18:30 - 20:00

Zam'festa kaj jarfina kunveno ĉe EBGejo
Partoprenantoj kunportu manĝetaĵojn kaj/aŭ
trinkaĵojn

Sabato la 21a

9:00 - 16:30

KUPRO - KUrso por PROgresantoj (Wavre)André DEMARQUE ademarque@skynet.be (Tel : 0486 51 60 85).

JANUARO 2014

Sabatoj :

9:00 - 16:30

KUPRO - KUrso por PROgresantoj (Wavre)

la 4a kaj la 18a

André DEMARQUE ademarque@skynet.be (Tel : 0486 51 60 85).

Sabato la 25a

KER-Ekzamenoj en Antverpeno - parola kaj skriba

Pakistana popolkantistino **REŜMA** forpasis la 3an de Novembro



Reŝma estis glora Pakistana popolkantistino, kiu kantis en la Panĝaba. Ankaŭ estis fama en Barato. Ŝi forpasis en Doctors Malsanejo, Lahoro/Pakistano post longtempa sufero de gorgkancero.

Ŝi naskiĝis en vilaĝo 'Loha' apud Raĝasthano en Barato en la jaro 1947.

Ŝia familio migris al Pakistan post apartigo kaj ekloĝis en Karaĉio, Pakistano. Ŝi apartenis al romaa (cigana) familio. Ŝia plej fama kanto estis 'Lambi ĝudai (longa sopiro)'. Ŝi ne estas kun ni plu.



Saluton Kara Legantaro !



Forpasis Albert Jacquard kaj tristegas ni. Utopio aŭ Barbareco ? Tiel senĉese Albert Jacquard respondecigis homojn per tia konscio ke oni konstruas la estontecon de nia «homara raso»... hodiaŭ mem, per nia akcepto aŭ malakcepto de tiu mortinganta logiko de nia kapitalisma, milita sistemo. Ankaŭ Albert Jacquard energie subtenis nian lingvon. Jes ja, li bone komprenis ĉian avantaĝon de nia trezoro «Esperanto» ! Domaĝe ke li tute ne estas konata internacie. Mankas surrete tradukojn, subtitolojn Esperante ĉe Youtube, ... La jaron 2013 forte markis la reveno de faŝismo en Eŭropo. «Novaj nazioj» murdis Clément en Francio, Pavlos en Greklando, ... Ĉie en Eŭropo, ili atakas

enmigrantojn, romaojn, sindikalistojn, ... Pro tio, ni deziris aperigi Manifeston kontraŭ faŝismo en tiu ĉi revuo... Ekas urĝe ...


Ni deziras al ĉiuj plene ĝui la vivon kaj ... interveni en la ne-fatala parto de la iĝo. Ni tute kapablas agi komune por ŝanĝi nian sorton !

Samy kaj Laur'
aktuala@esperantobruselo.org



Enhavo

- Paĝo 2 : Mondmuziko
- Paĝo 3 : Kolofono kaj agendo
- Paĝo 4 : Edito kaj enhavo
- Paĝo 5 : Kotiz-tabelo 2014
- Paĝo 6 - 7 : Raporto de la Ĝenerala Asembleo
- Paĝo 8 - 9 : Batalo por lingva diverseco
- Paĝo 10 : Faŝismo ne pasu!
- Paĝo 11 - 12 : Eŭropa kontraŭfaŝisma Manifesto
- Paĝo 13 - 14 : Or-minejoj en Halkidiko
- Paĝo 15 - 16 : FESTO 2013, bonega festivalo !
- Paĝo 17 : Alico en Mirlando / Voĉo de la Tempo
- Paĝo 18 : Vojaĝo per biciklo
- Paĝo 19 : Origamio
- Paĝo 20 : Koncerto de Gaetano



A. Jacquard (David Trembla - 2013)

KOTIZ-TABELO 2014

Bonvolu laŭ eble rekotizi nun!

Kotizoj al FEL/APE/UEA normale ne estos perataj post la fino de februaro!

Nro	Kodo	Kategorio	Kotizo (€)	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO				
11	MEM	Membro de EBG	10	} Reta "Aktuala"
12	MEM-R	Membro - junulo (ĝis 26-jara)	5	} (dumonata organo de EBG) + } partopreno en la vivon de la Grupo
13	MEM-S	Membro - pensiulo, senlaborulo	7	
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	partopreno en la vivon de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj presita "Aktuala" dum la tuta vivo (25x MEM kotizo)
19	PAK	Presita AKTUALA	3	Krompago por ricevi presitan version de Aktuala
20	PAK-E	Presita AKTUALA ekster Belgio	6	Krompago por ricevi presitan version de Aktuala ekster Belgio
BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ				
22	FEL	Membro de la FEL Flandra Esperanto-Ligo	25	Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)
25	APE-M	Membro de APE Asocio Por Esperanto"	25	Kun abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
26	APE-SM	Subtena membro de APE "Asocio Por Esperanto"	ekde 30	Kun abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
27	EeM	Nur abono al la revuo "Esperanto en Marche"	16	Nur abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO				
31	SA	Simpla abonanto de "Esperanto"	40	Abono al "Esperanto", la monata organo de UEA
32	Kto	Simpla abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", la junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro de UEA kun "Jarlibro"	26	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	63	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro de UEA kun "Gvidlibro"	11	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	126	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEAn
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1.575	MA de UEA dum la tuta vivo!

NOTOJ:

Pagu al la bankkonto **IBAN : BE87 5230 8055 0794, BIC : TRIOBEBB** de la **Esperantista Brusela Grupo**

Por efike subteni nian agadon, estas konsilinde membriĝi ankaŭ siajn familianojn, se ili ne kontraŭas Esperanton !

EBG peras kotizojn al APE, FEL au UEA **nur por siaj propraj membroj !**

Nepre indiku la celon de via pago per literaj [aŭ, se vi ĝiras elektronike, ciferaj] kodoj, ekz. "MEM+APE" aŭ "11 21"

La JARLIBRO de UEA enhavas informojn kaj milojn da adresoj.

La GUIDLIBRO de UEA enhavas la samajn informojn, sed sen la adresoj.



Ĝenerala Asembleo de EBG 2013

kiu okazis en nia klubejo : Van Maerlant-strato 2, en 1000 Bruselo, la 23an de Oktobro

Ĉeestintoj:

- Angelos TSIRIMOKOS
- JM Nicolas de BUYL
- Laurent LOISSE
- Jan AMADORI
- José PINTO DE SOUSA
- Paulo BRANCO
- Françoise PELLEGRIN
- Barbara POTERUCHA
- Eric BAERT
- Yves DE KEYZER
- Walter VERMEIR
- Claire CHUET
- Francine SPERBER
- Joëlle DEBRUYNE-GUILLAUD
- Neven KOVAČIĆ
- David FERNANDEZ
- Stefano GENCO
- Clara BRACKE

La estraranoj estas:

- Angelos TSIRIMOKOS (Prezidanto)
- JM Nicolas de BUYL (Estrarano)
- Laurent LOISSE (Sekretario)
- Jan AMADORI (Kasisto)
- José PINTO DE SOUSA (Estrarano)
- Paulo BRANCO (Estrarano)
- Michael CWIK (ne ĉeestis) (Estrarano)

La efektivaj membroj estas:

- Françoise PELLEGRIN
- Francine SPERBER
- Yves DE KEYZER
- Hugues DE KEYZER (ne ĉeestis)
- Eric BAERT
- Clara BRACKE
- Marcel DELFORGE (ne ĉeestis)
- Barbara POTERUCHA
- Bernard-Régis LARUE (ne ĉeestis)

La Prezidanto, Angelos TSIRIMOKOS proponas malfermi la Ĝeneralan Asembleon per silenta minuto por honori la memoron de **Hélène FALK** kiu forpasis pasintan someron. (je la 18a45)

1. La kvorumo estas trafita (ĉeestis 12 membroj el 16 t.e. 3/4 de la efektivaj membroj)
2. Ĉiuj aprobis la pasintjaran protokolon.
3. Jan AMADORI prezentas la Ĝeneralan Bilancon.
 - 3.1. Jan AMADORI memorigas al ni ke nur la konto ĉe banko TRIODOS funkcias, kaj do, ke nia antaŭa poŝtkonto ne plu ekzistas.
 - 3.2. Ni ĉiuj kore dankas nian kasiston Jan AMADORI pro la klaraj klarigoj pri la Bilanco
 - 3.3. Angelos TSIRIMOKOS kontentas pri la rezulto de la bilanco. Ni ja havas etan deficiton, sed estas tute akceptebla. Ni povas konsideri ke ni havas ekvilibrantan bilancon.
 - 3.4. Angelos TSIRIMOKOS komentas la **Moralan Raporton** : La klubo bone funkcias. Ni daŭriĝas sukcese 2 kursojn, unu por komencantoj kaj la alia por progresantoj. Bedaŭrinde, ni ne havas regulajn okazaĵojn en la klubejo mem. Por la estonteco, ni provu organizi almenaŭ unu fojo monate prelegon aŭ ion ajn en la klubejo por partoprenigi niajn membrojn. Sed, ni havis ĉi-jare 4 esperanto-kafejojn kaj kelkajn vizitojn, eskapadojn kiel en la bierfarejo «CANTILLON», en la ceramikejo de Claire CHUET, ... Ankaŭ en Bruselo okazis serĉpromenado. Tio signifas ke pli kaj pli ni estas viditaj de la ekstera mondo. Angelos TSIRIMOKOS konsideras ke ni ŝanĝis la direkton de nia klubo laŭ agrabla vojo. Ankaŭ, monon bonmaniere ni uzis : ni apogis la indonesian movadon, la asocion «Lernu», ktp ... La estraro plijuniĝas, pliviglas.
Pluraj membroj de EBG partoprenis ĉijare al :
 - PEKO (kie pluraj partoprenintoj faris KER-proveksamenon)
 - FESTO
 - KER-ekzamenoj
 Ankaŭ notinda : En la gazeto «METRO», aperis pozitiva artikolo pri Esperanto.
4. La kontoj estas aprobitaj de la asembleo kaj revizoro, Eric BAERT kaj la nuna estraro malŝarĝita.
5. Neniu kandidato prezentis sin por esti la nova Prezidanto.

Nikolao precizas ke pro personaj kialoj kiuj povas malhelpi plenumi bone tian taskon, li ne volas preni tiun ŝarĝon ĉijare.

Pro emeritiĝo kaj regulaj eksterlandaj vojaĝoj, Angelos TSIRIMOKOS rezignas sian postenon de Prezidanto.

6. Finfine, JM Nicolas de BUYL konsentas esti jam la nova Prezidanto de EBG (por ke ne endas modifi en la ŝtatgazeto denove venontjare). Angelos kiu tamen restos Vic-Prezidanto, daŭre agos kiel prezidanto dum kelkaj monatoj kaj dum tiu periodo li transdonos ĉiujn informojn kaj dokumentojn pri nia klubo al la nova Prezidanto.
Pro emeritiĝo kaj regulaj eksterlandaj vojaĝoj, Paulo Branco ne plu estos estrarano. La cetero de la estraro restas. Estas notinda ke neniu havas novaĵojn pri Michael CWIK.
7. Ni havas ne jam klaraj planoj aŭ projektoj menciindaj. Neniu propono de la membroj.
8. Krom la necesaj modifoj pri la ekziĝoj kaj enpostenigadoj de la estraranoj, ne necesas ŝanĝi la statutojn.
9. Ni decidis daŭrigi la subtenon al EEU kiu nun estas po 1€ por membroj.
10. Ĉar pli kaj pli estas malfacile por enirigi, inviti homojn, scivolemajn komencantojn, ktp... eĉ por la klubanoj mem, kaj plie, ni baldaŭ ne plu havos regulan membron el la Eŭropa Komisiono, ... ĉiuj akceptas la ideon ke EBG translokiĝu. Tamen se eblas, estus plibone ne tuj tute forlasi nian nunan klubojn en la Eŭropa Komisiono, okaze ke ni malkovras ke la elektita translokiĝejo fine ne bone taŭgas al ni. Ni do havos eblecon reveni portempe en nia antaŭan kunvenejon.

Ekzistas ebleco translokiĝi en lokaloj de la asocio UPJB kiu situas ne malproksime de la centro de Bruselo, en vigla kvartalo: «SAINT-GILLES». UPJB estas juda progresanta asocio (Union Progressiste des Juifs de Belgique) kiu kore bonvenigas nin. La luado de la loko kostas 30€ por 1 vespero semajne por 2 ĉambroj (unu eta + granda ĉambro), sed ni ankoraŭ diskutu la prezon por la tuta jaro, ktp ... Estas ebleco havi nian bibliotekon surloke. En la UPJB, ni profitos bonegajn modernajn materialojn (seĝojn, tablojn ...) kaj teknikaĵojn (sonmaterialon, ekranon, ...) sed ankaŭ oni povas uzi la tieajn trinkejon kaj kuirejton. Plie ni ankoraŭ rajtos kunporti niajn proprajn trinkaĵojn kaj vendi ilin profite al la klubo. Tia maniere ni povos uzi tiun etan profiton por pagi parton de la luprezo.

Françoise PELLEGRIN, rimarkigas ke tiu loko ne estas tute neŭtrala kaj tio povus eble malutili al nia klubo. Tion ni devas taksu antaŭ ol translokiĝi. La movo en UPJB estas konsiderinda. Ĉu vere eblas trovi neŭtralejon ien ajn? Ĉiaokaze, ni daŭrigu pluesplori la translokiĝajn eblojn. Ĉiuj akceptas la ideon organizi se eblas nian baldaŭan Zam' Feston en UPJB.

11. Bedaŭrinde neniu proponas sin kiel respondeculo por la organizo de kunvenaj agadoj (prelegoj, ktp...).
- David TREMBLA prelegos la 27an de Novembro pri la Eŭska lingvo kaj ankaŭ Neven KOVAČIČ prelegos poste.
12. La eldono de nia revuo AKTUALA daŭrigos sammaniere kiel nun: laŭ papera kaj elektronika (surrete) versioj. Ĉiudumonte, ni presas pli/malpli 80 paperajn revuojn (le kiuj 20 por disdoni reklamcele aŭ simple konatig-cele al asocioj). Por la plimulto de la paperaj revuoj, estas koloroj nur sur la 4 kovrilpaĝoj, la cetero restas nigre/blanke presita. Pli/malpli 50% de la revuoj estas senditaj rete, 50% papere. Por la venonta numero, ni kunmetos ĝirilon por ĉiuj abonantoj kaj abonintoj (kiuj eble forgesis reboni pasintjare).
 13. Angelos ankaŭ bedaŭras la neatenditan forpason de Claude COLLET (filo de Dina DELOYER) en Aŭgusto
 14. Françoise PELLEGRIN dankas la estraron pro la grandega laboro farita ĉi-jare kaj la asembleo kore dankas ŝin pro ŝiaj altkvalitaj kursoj, pro ŝiaj energio kaj preteco, ...

La Prezidanto fermas la ĉijaran Ĝeneralan Asembleon, ĉirkaŭ la 21a30

La sekretario

Batalo por la lingva diverseco

Le Monde
diplomatique



★ en Esperanto - eo.mondediplo.com

PARTOPRENIGA DEMOKRATIO, respondeca mastrumado de la naturriĉaĵoj kaj de la rubaĵoj, justa komerco, liberaj programoj ... : socia forumo devas montri en sia propra organizaĵo la ŝanĝojn kiujn ĝi volas subteni. Ĝi devas speciale certigi la rajton de la partoprenantoj komuniki en la lingvo de sia elekto ; ĉar, tiukampe, oni ne eskapas el la meĥanismoj de dominado. Post la uzado de konvencia servo de buŝtradukado en la hispana, portugala, franca kaj angla por la plensesioj de la du unuaj okazigoj de la Monda Socia Forumo (MSF) en Portalegro, en 2001 kaj 2002, iuj el la aktivuloj mobiliziĝis por la lingva diverseco kaj por certigi la buŝtradukadon dum la unua Eŭropa Socia Forumo (ESF) en Florenco. Tiel naskiĝis la internacia reto *Babels*, kiu ĉeestas en la plej multaj forumoj organizitaj en la dek lastaj jaroj.

Krom la neeviteblajn vehiklajn lingvojn, *Babels* proponas tiujn de la loko, kie la forumo okazas : la hindian kaj la maratian dum la MSF de Bombaĵo en 2004, la keĉuan dum la Socia Forumo de Ameriko en Kito, en 2004, la katalunan ĉe la Mediteranea Socia Forumo de Barcelono en 2005, la grekan ĉe la ESF de Ateno en 2006, la svedan ĉe la ESF de Malmö en 2008, la britan signolingvon (BSL) ĉe la ESF de Londono en 2004 kaj la brazilan (*Libras*) ĉe la MSF de Portalegro en 2005, la araban en la MSF de Tunizo en 2013. Aldoniĝas strategiaj lingvoj por etendo de la forumoj en la subrepresentataj regionoj : hindiaj lingvoj (la telugua, la bengala, la malajama) kaj aziaj (la korea, la indonezia, la japana kaj la taja) en Bombaĵo, lingvoj

mediteraneaaj, centreŭropaj kaj orienteŭropaj en Londono, Barcelono kaj Ateno.

Krom la lingva diverseco, la paroladoj, vortoj kaj konceptoj interŝanĝataj ene de tiuj manifestacioj prezentas malfacilaĵojn por la profesiaj buŝtradukistoj. Por prepari la terenon, la volontuloj de la asocio *Ecos*, starigita ĉe la Fakultato pri tradukado kaj buŝtradukado de la universitato de Granado, inventis la situacion preparon („*sit-prep*”) Tiu trejnado, organizita laŭ la lingvoj kaj la sojloj de malfacilo, ebligas al la novuloj ekzerci sin dum samtempa buŝtradukado per filmetoj filmitaj dum la antaŭaj forumoj.

La tradukproblemoj fariĝas kultura riĉfonto pro la projekto *Vortaroj* [1], kiu konsistas en ellaborado de plurlingvaj glosaroj de ŝlosilvortoj ligitaj kun la grandaj diskutataj temoj. „*La volontulaj buŝtradukistoj estas la filtriloj, sur kiuj stumblas ĉiuj komunikaj problemoj de la alimondisma movado*”, [2] klarigas s-ino Stéphanie Marseille, animanto de *Vortaroj*. Ekzemple la nocioj „varigo” aŭ de „alimondismo”, kies traduko en plurajn lingvojn estas nun plene akceptita, faris problemojn, kiam ili estis ekuzataj.

Organizaĵoj kaj aktivuloj devus esti egalecaj pri la rajto je komunikado ; kaj, pli precize, kia ajn estas ilia funkcionmaniero, iliaj ideologiaj pozicioj kaj iliaj financaj resursoj. Por atingi tiun celon oni devas mutualigi la resursojn, kio povas alpreni plurajn formojn. Ideale, la kostoj (materialo

por la budetoj de samtempa buŝtradukado, biletoj por volontulaj buŝtradukistoj, presado de la programo ktp) estas kovrataj de solidarec-fonduso starigita de la partoprenantaj organizaĵoj laŭ iliaj kapabloj. Aldoniĝas publikaj kaj privataj financadoj.

Por malaltigi la buĝeton por buŝtradukado, *Babels* kelkfoje decidas kovri la bezonojn de iuj asocioj, kiuj havos eventojn antaŭ aŭ marĝene de la kunveno, interŝanĝe kompensi biletojn, eĉ loĝadon, de la volontuloj. Tiu strategio ne estas tute sen risko de mallojala konkurenco vide al la lokaj profesiaj buŝtradukistoj. Tiuj, ĉu membroj aŭ ne de la reto, ne aplaudas libervolan servon proponatan al organizaĵoj, kiuj havas kelkfoje plurmilionojn da eŭroj de jara buĝeto.

Alia metodo aplikata por kompensi la nesufiĉajn fondusojn konsistas en starigo de aliĝkotizoj por la partoprenantaj organizaĵoj, kun kromaĵo laŭ la nombro de postulataj lingvoj por buŝtradukado. Sed, farante tion, oni vundas la principon de egaleca partopreno, sur kiu baziĝas la volontuleco.

Por ke la lingva diverseco ne estu nur fasado kaj ke ĝi implicu realan demokratiigon, la forumoj devas ankaŭ, de unu prepara asembleo al la alia, mobilizi la celatajn lingvaj kaj kulturajn komunumojn. Nu, la multiĝo de la forumoj kaj ilia loĝistika komplekseco kondukas al ia elĉerpiĝo, kaj la dominantaj lingvoj konservas precipan pezon en la programo.

La batalo por la lingva diverseco stumblas kelkfoje sur manko de subteno de la organizantoj mem, kiuj ne ĉiam komprenas la gravecon. S-ino Barbara Molnarova, membro taskita mobilizi volontulojn en la lingvoj de centra kaj orienta Eŭropo dum la ESF de Ateno, rakontas ke, por la organizado de la prepara asembleo en

Prago, en 2005, la ĉeĥaj organizantoj postulis la francan, la anglan kaj la rusan - kiun ili konsideris „*la Esperanto de orienta Eŭropo*” [3] - anstataŭ la grekan kaj la ĉeĥan.

La observitaj diferencoj inter la planado kaj la realaj bezonoj povas instigi la organizaĵojn dungi pagatajn buŝtradukistojn – kio kreas streĉiĝojn kun la volontuloj – aŭ lastminute modifi la lingvan planadon de la salonegoj. Ekzemple en Ateno buŝtradukistoj de malplimultaj lingvoj plendis, ke oni forigis ilin el iliaj tradukbudetoj por cedi al buŝtradukistoj de lingvoj, kiujn la organizantoj taksis pli „utilaj”.

En la programo de la MSF de Tunizo, ĉi-jare, aperis nur vehiklaj lingvoj (la araba, la franca, la hispana kaj la angla), signo de manko de subteno al la malplimultaj lingvoj kiel la tamaziĥta (berbera). Tiel ŝajnas malfermiĝi breĉo inter politikaj principoj kaj loĝistikaj praktikoj. Buŝtradukistoj kaj aliaj volontulaj agantoj de la multlingvismo devas ludi esencan rolon por refermi ĝin.

Julie BOÉRI,

membro de la reto Babels kaj instruisto-esploristo pri komunikado ĉeuniversitato Pompeu Fabra, Barcelono

[1] Alilingve „Lexicons”. -vi

[2] „Réflexion sur les langues dans le mouvement altermondialiste : séminaire FSE 2003” [Pensado pri la lingvoj en la alimondisma movado : ESF-seminario 2003], 30-a de novembro 2003, www.babels.org.

[3] „*Babels Report on Prague EPA*”, 11a de septembro 2005, www.babels.org.

LE
MONDE
diplomatie en Esperanto

Faŝismo ne pasu !

En Grekio okazas teruraĵoj, sed ne temas pri nur greka problemo. La unua kaj plej grava el ili estas la ekonomipolitika krimo kontraŭ la greka loĝantaro plenumita kaj plu plenumata de elito formita el bankistoj, politikistoj kaj altrangaj ŝtatservistoj, nun gvidanta la destinon de Eŭropo kontraŭ la popolo, kontraŭ kolektiva digno, kaj for de justeco kaj daŭripovo. Alia teruraĵo kiu nun okazas estas la leviĝo de malkaŝe nazia partio, Ora Tagiĝo, kiu ekestabliĝas en socio, en maniero nepensebla nur antaŭ kelkaj jaroj.



Se tiu fenomeno – kiu ne estas problemo specife greka, sed eŭropa – ne ricevas klaran respondon en ĉiu lando kaj je kontinenta nivelo, aparte de la malgrandaj jam organizitaj kontraŭfaŝistaj grupoj, la politika drivado suferata de niaj landoj fariĝos ekstreme sombra. Ne temas pri malnovaj fantomoj de la pasinteco, de jam superitaj aferoj, temas pri novaj realaĵoj kiuj modlas la estontecon de la popoloj de Eŭropo.

Dum longa tempo la greka ĵurnalisto Jorgos Mitralias, kune kun aliaj kontraŭfaŝistoj, faris paŝojn por halti la reaperon de la nov-faŝisma ekstremdekstro, kaj en Grekio kaj ankaŭ en aliaj partoj de Eŭropo. Sekvo de tiu reago estas la Eŭropa Kontraŭfaŝisma Manifesto, lastatempe apogita de la sociopolitika movado Siryza, en februaro de 2013.

Ni kuraĝigas ĉiujn personojn ĝin subskribantajn, aktive ĝin subteni kaj disvastigi. Ni instigas ĉiujn geĉivitanojn sin organizi por alfronti ĉi tiun socian malsanon kiu renaskiĝas kiel falsa respondo en krizaj tempoj.

Ni ne povas rigardi en alian direkton. Nun pli ol iam, ni devas defendi kaj favori alian Eŭropon: liberigan, kreivan kaj vere demokratian por ni ĉiuj, kiuj tie vivas.

Ĉi-foje la historio ne devas ripetiĝi!

Iniciatinta Komitato de la Eŭropa Kontraŭfaŝisma Manifesto

<http://antifascismeuropa.org/nos/esperanto-eo>



Kontraŭfaŝistoj en Italio, post la murdo de Clément Méric en Francio (Junio 2013)

Eŭropa Kontraŭfaŝisma Manifesto

Sesdek ok jarojn post la fino de la Dua Mondmilito kaj la malvenko de faŝismo kaj naziismo, ni ĉeestas preskaŭ ĉie en Eŭropo la supreniron de la ekstrema dekstro. Sed, kaj tio estas eĉ pli timiga fenomeno, ni konstatas la aperon kaj kreskadon, je la dekstro de tiu ĉi ekstrema dekstro, de klare nov-naziaj fortoj kiuj, en iuj kazoj (Grekio, Hungario, ...) enradikiĝas en la socio konstruante vere amaspopolajn movadojn, radikalajn, rasismajn, ultra-perfortajn kaj pogromemajn. Ilia deklarita celo estas detruo ĉiujn sindikatajn, politikajn kaj kulturajn organizojn de la laborista klaso, disbati ajnan civitanan reziston, nei la rajton je malsameco kaj ekstermi, eĉ fizike, tiujn kiuj estas "malsamaj" kaj tiujn plej vundeblajn.

Same kiel en la 20-aj kaj 30-aj jaroj, la fina kaŭzo de tiu ekstremdekstra kaj nov-faŝisma minaco estas la profunda ekonomia, socia, politika kaj eĉ morala kaj ekologia krizo de l' kapitalismo kiu, pretekste de l' ŝuldokrizo, kondukas al senprecedenca atako kontraŭ la vivnivelo, la liberecoj kaj rajtoj de la laboristoj, de ĉiuj troviĝantaj malsupre de l' socio!

Ekspluatante la timojn de l' povuloj je la riskoj de socia eksplodo, la radikaliĝon de mezklasuloj minacataj de la krizo kaj la drakonaj rimedoj de alĝustigo, kaj ankaŭ la malesperon de marĝenitaj kaj malriĉiĝintaj senlaboruloj, la ekstremdekstraj kaj precipe novnaziaj kaj novfaŝismaj fortoj kreskas ĉie en Eŭropo. Ili gajnas amasinfluan en la plej malriĉaj tavoloj de la socio, kaj direktas tiun influon sisteme tiel kontraŭ tradiciaj kaj

novaj propekaj kaproj (enmigrintoj, islamanoj, judoj, gejoj, handikapuloj,...) kiel kontraŭ la sociaj movadoj, la maldekstremaj organizaĵoj kaj la laboristaj sindikatoj.

Veras ke la influo kaj radikalismo de tiu ĉi ekstrema dekstro ne estas la sama en la tuta Eŭropo. Tamen, la ĝenerala aplikado de severaj politikoj de alĝustigo kaŭzas ke la leviĝo de la ekstrema dekstro fariĝas preskaŭ ĝenerala fenomeno. La konkludo klaras: la fakto ke la spontana supreniro de la ekstrema dekstro kaj la apero de la amasa ultra-perforta novfaŝismo ne plu

estas escepto al la eŭropa regulo, nun pelas la antifaŝistojn de tiu ĉi kontinento alfronti ĉi tiun problemon en ĝia reala dimensio, tio estas, kiel tuteŭropa!

Tamen, aserti tion ĉi ne sufiĉas, se ni ne aldonas ke la lukto kontraŭ ekstrema dekstro kaj nov-naziismo estas absolute urĝa. Fakte, la nov-faŝisma

minaco en multaj eŭropaj landoj estas jam tiel rekta kaj tuja, ke ĝi igis la kontraŭfaŝisman lukton unuaranga prioritato, batalo pri vivo kaj morto, en kiu troviĝas en risko la maldekstraj kaj laboristaj organizaĵoj, la libereco kaj la demokratiaj rajtoj, la valoroj de solidareco kaj toleremo kaj la rajto je malsameco. Aserti ke ni estas engaĝitaj en vetkurado kontraŭ rasisma kaj novfaŝisma barbareco korespondas al realo konfirmata ĉiutage en la stratoj de niaj eŭropaj urboj...



Konsiderante la profundon de la krizo kaj la grandecon de la sociaj damaĝoj kiujn ĝi produktas, la intensecon de politika dispolusado, la decidemon kaj agresemon de la regantaj klasoj, la historian gravecon de la defioj en la nuna konflikto kaj la amplekson de la supreniĝo de la ekstrema dekstro, estas memevidente ke la kontraŭfaŝisma lukto fariĝas strategia elekto postulanta organizan planon kaj longperspektivajn politikajn kaj aktivulajn investojn. Sekve, la kontraŭfaŝisma lukto devas esti strikte ligita al ĉiutaga batalo kontraŭ la alĝustigaj rimedoj kaj la sistemo ilin generanta.

Por esti efikaj kaj plenumi la esperojn de la loĝantaro, la kontraŭfaŝisma lukto devas organiziĝi en maniero unuiga kaj demokratia kaj esti kreita de la popolaj amasoj mem. Tiucele, la civitanoj devas mem organizi sian kontraŭfaŝisman lukton kaj sian memdefendon. Samtempe, kaj por esti efika, tiu batalo devas esti tutmonda, alfrontante la ekstremajn dekstron kaj la novfaŝismon ĉie, kie manifestiĝas la veneno de rasismo kaj ksenofobio, ŝovinismo kaj militarismo, de la kulto de blinda perforto kaj la neado de gaskameraoj kaj eĉ de Aŭŝvico mem. Mallonge, por esti efika longperspektive, la kontraŭfaŝisma lukto devas proponi en sia agado alternativan vizion de la socio, diametre kontraŭan al tiu proponita de la ekstrema dekstro.

Tio estas, socio fondita sur solidareco, toleremo kaj frateco, malakcepto de masklismo, malakcepto de virina subpremado kaj respekto al la rajto je malsameco, internaciismo kaj skrupula protekto de la naturo, defendo de demokratiaj kaj humanismaj valoroj.

Ĉi tiu eŭropa kontraŭfaŝisma movado devas esti la heredanto de la grandaj kontraŭfaŝismaj tradicioj de nia kontinento!

Tiucele ĝi devas provizi la bazojn de socia movado kun stabilaj strukturoj kaj ĉiutagaj aktivadoj, penetrante la tutan socion, organizante la kontraŭfaŝismajn civitanojn en retoj laŭ ilia profesio, loĝloko kaj inklino, efektivigante la lukton en ĉiuj kampoj de l' homa agado kaj plene alprenante la taskon protekti, eĉ fizike, la plej vundeblajn kuncivitanojn, la enmigrintojn, la ciganojn, la naciajn kaj etnajn minoritatojn, la islamanojn, la judojn aŭ la geojn, ĉiujn, kiuj fariĝas la sistemaj viktimoj de la ŝtata rasismo kaj la faŝisma banditaro.



Tial ke la bezono por kontraŭfaŝisma mobilizado sur eŭropa skalo fariĝas tagon post tago pli prema, la subskribantoj de tiu ĉi manifesto, alvokas por la starigo de amasa, unuigita kaj demokratia Eŭropa Kontraŭfaŝisma Movado, kapabla alfronti kaj venki la brunan peston kiu denove levas sian kapon sur nia kontinento. (...)

Ĉi-foje, historio devas ne ripetiĝi!

ILI NE PASOS !




Lastan 9an de Novembro estis

«Tutmonda agadtago kontraŭ la or-minejoj en Ĥalkidiko»

Tio, kio okazas

Ĥalkidiko estas el tiom natura beleco ke ĉiujare, ĝi estas inundita de turistoj kiuj venas el la tuta mondo. En okcidenta parto de Ĥalkidiko, troviĝas la praa arbaro de Skurioj. De kelkaj jaroj, la plurnacia minfirmao *Eldorado Gold* estas instalita en skurioj kaj, kun helpo de surlokaj potencaj privataj interesoj, ekspluati minajn ekstraktadojn grandskale.



konsultadon pri la ora ekstraktado en nia regiono, ili prokrastis la aferon kiu fakte neniam okazis.

Kiam ni petis opinion de neŭtraj sciencistaj instancoj pri la potencialaj efikoj de la ekstraktado sur niaj vivoj, ili eksplikis al ni

ke la detruado fariĝos neriparebla, tiom por ekosistemo kiom por la regiona ekonomio.

Kiam ni submetis la aferon al taŭgaj tribunaloj, tiuj-ĉi procedis al kontrolo de la leĝkonformo de la ekstraktad-permesiloj, ne decidante pri la enhavo kaj do, ne pri la detruado.

Kiam ni manifestaciis kontraŭ la minejoj, specialaj fortoj de la polico intervenis samkiel okupada armeo, kun perforto kaj teroro kontraŭ ni kaj niaj infanoj.

Kiam, en aŭgusto, estis oficiale anoncite ke en la vilaĝo Neoŝori, kiu troviĝas en nia regiono, la trinkebla akvo ne plu estas trinkebla pro ĝia enteno en arseniko, la Ŝtato ne plenumis enketon por koni la potencialan ligilon inter la ĉeesto de arseniko en la akvo kaj la boradoj realigitaj de la minfirmao proksime de la fontoj kiuj provizas la vilaĝon je akvo.

Kiam, tute freŝdate, la institucioj de Eŭropa Unio ekzamenis la ŝtathelpon al « investadoj », la Kortumo de Eŭropa Unio kondamnis Grekion ĉar ĝi akordis al la ekstraktadaj firmaoj de Ĥalkidiko milionojn da eŭroj da kontraŭleĝaj helpoj.



Tiel, la neriparebla detruado de la ekosistemo de Skurioj estas jam komencita estigante gravajn danĝerojn de poluado de grundo kaj grundakvejo de la tuta okcidenta Ĥalkidiko per pezmetaloj .

Kiam maljusteco estas leĝo

Ni loĝas en Ĥalkidiko kaj ni estas fiŝkaptistoj, terkultivistoj, bredistoj, abelistoj, aferistoj kaj sciencistoj. Entute, ni estas homoj kiuj amas nian landon.

Kiam, antaŭ pluraj jaroj, ne petis de niaj aŭtoritatoj informojn kaj publikan

Kiam ni iras en la arbaro Skurioj por prizorgi niajn abelujojn, ni renkontas armitajn homojn de *Eldorado Gold* kiuj kontrolas niajn identecojn kaj malpermesas al ni aliron.



Kaj nun, la greka Ŝtato kvaliligas nian movadon de « krima movado » kaj similigas niajn aktivecojn al la krima aktiveco de la nazia Ora tagiĝo.

Ĝi malliberigis kvar el la loĝantoj kaj komencis persekutojn kontraŭ dekoj da aliaj, atribuante juran karakteron al la perforto kaj maljusteco de kiuj ni estas viktimoj.



Rezisti estas devo

Ni estas loĝantoj de Ĥalkidiko kaj solidaraj grekoj el la tuta lando. De tri jaroj, ni surstratiĝas por lukti por nia lando. Ni postulas ne nur niajn rajtojn. Ni postulas

nian vivon kaj estontecon, la vivon kaj estontecon de niaj infanoj.

Ni estas solidaraj kun iu ajn persono kiu luktas por vivo, egaleco, libereco, digneco. La puno kaj subpremo de la luktoj de sociaj movadoj kiuj subtenas la fundamentajn rajtojn reprezentas la solan reagon de la potenca sistemo en paniko.

Nia devo estas la protekto, parolante laŭte, de ĉiuj kiuj rezistas kontraŭ arbitra sinteno de la potenco. Ni opinias ke, unuiĝintaj, ni estas fortaj.

Ni lanĉas alvokon por ke, sabaton 9an de novembro, manifestacioj, eventoj, agadoj okazu en la tuta mondo por ĉesigi la persekutadojn kaj malliberecon de la loĝantoj kiuj luktas, kaj por ke tuj haltu la ekstraktadajn aktivecoj en Ĥalkidiko



Nia lukto estas en kriza momento. Nun, ni bezonas vin, vin ĉiujn.

https://www.oceanews.fr/20131109-skouries-9-novembre-2013-journee-mondiale-chalcidique?utm_source=wysija&utm_medium=email&utm_campaign=Actuelujour

FESTO 2013 : Estis bonega festivalo !

Ĉi-jare la muzika festivalo FESTO okazis la 10–18an de aŭgusto en Kelmis – la iama ĉefurbo de la iama Neŭtrala Moresneto.

Tiu stranga teritorio aperis en 1816, kiam Nederlando kaj Prusio konkurence volis posedi tiean zinkminejon. Post la sendependiĝo de Belgio (1830), Moresneto troviĝis inter Belgio kaj Prusio (poste Germanio). En 1908 Wilhelm Molly proklamis tie la Esperanto-ŝtaton Amikejo, sed la Unua Mondmilito, post kiu la “insulo” ekapartenis al Belgio, forgesigis la historion de Amikejo...

La akceptejo de FESTO malfermiĝis sabate, la 10an de aŭgusto, kaj post la vespermanĝo okazis interkona vespero. Dimanĉe komenciĝis provludoj, kaj ekfunkciis la libroservo de FEL kaj la diskoservo de *Vinilkosmo*.

La artan programon malfermis la vespera koncerto de Nikolin', kiu post longa paŭzo revenis sur la Esperantan scenejon kun sia gurdo kaj kun kanzonoj en la franca, valona kaj Esperanto.

Post la sukcesa koncerto de Nikolin', *Kapriol'!*

surscenejiĝis, kaj tuj komenciĝis folka balo. La etoso ekflamis, kaj la partoprenantaro plene ĝuis la muzikon

kundancante. Feliĉo lumis sur la vizaĝoj de la dancantoj kaj de la artistoj. Unuafoje ni vidis tiom etosigan koncertan balon de *Kapriol'!* Post la balo la homoj iris al la drinkejo kaj gufujo por daŭrigi la feston.



La lundan posttagmezon *Kapriol'!* reaperis kun sia folkdanca ateliero; muzikante ili promenadis en la tuta festejo kaj revenadis en la koncertejon, sekvataj de pluraj

partoprenantoj por danci kune en la ejo.

La lundan vesperon komencis Kimo kun sia akordiono (nova kaj elektronika!) kaj gastoj: Roĉjo ĉe fluto, Sebastian (de *La kuracisto*) ĉe violono en kelkaj kantoj kaj ĉe ukulelebaso en aliaj; eĉ Jonny M kantis gaste... Pro la kantoj bone konataj la etoso rapide varmiĝis dancigante la homojn. Post mallonga paŭzo ekkoncertis la

brusela artisto Gaëtano, kiu kantis kaj gitaris kun akompano de la basisto Olivier Catala. Lia koncerto estis bonega, kaj la spektantoj gustumis ĉiujn kantojn de Gaëtano plenumitaj per la bela kaj brila voĉo...

Post la koncerto Gaëtano iris al tablo por prezenti sian diskon kaj faris multajn subskribojn sur la diskolibretoj. Poste la koncertejo transformiĝis al diskejo por la nokto...

Marde, la 13an, funkciis la salsa ateliero, kiun gvidis Kimo kun la helpo de Meva, kaj la gurda ateliero de Nikolin'. Okazis vizito al la muzeo de Kelmis, al kiu la festanoj iris kun esperantaĵoj kaj muzikiloj kvazaŭ manifestacie.

Vespere JomArt kaj Nataŝa regalis la ĉeestantaron per emociplena koncerto kun tipe intima etoso, kiun ili scias krei dum siaj spektakloj...



Merkredo estis ekskursa tago kun vizitado de Eupen kaj Maastricht; kaj Irek Bobrzak el *Varsovia Vento* kaptis la okazon por intervjui neekskursemulojn.

Vespere okazis plia koncerto de Nikolin', ĉi-foje nur en Esperanto, kun akompano de



Laŭrenzo (gitaro), Omar (ĝembeo) kaj Sebastian (ukulelebaso). Post ŝia elscenejĝo, la duopo *Kajto* daŭrigis kun

popfolka spektaklo.

La ĵaŭdan matenon, kvazaŭ *Kajto* dormus ĉesceneje, oni retrovis ilin en kantateliero, kiun sekvis gitarateliero de ĴomArt.

Vespere unue

Kimo kun Martin prezentis la plej famajn kantojn el la repertuaro de *Amplifiki*, al kio la publiko abunde kontribuis en la etosigo... La dua parto, pro la bedaŭrinda neveno de *Krio de*



Morto, pasis kiel internacia miksa koncerto kun pluraj artistoj.

Vendrede, la 16an de aŭgusto, en la unua parto



koncertis Martin kun kantoj el sia disko *Pli ol nenio* kaj kun novaj kantoj el la albumo, aperonta kadre de la Promeskampanjo de *Vinilkosmo...* Kiel kutime, Martin faris bonan koncerton kaj la publiko ŝatis ĝin.



En la dua parto prezentiĝis la belga triopa punka bando *René Binamé* (drumo kaj du gitaroj) kun trafaj kaj engaĝitaj liberecanaj tekstoj. Ĉe la tria kanto, esperantigita Platano, sur la sceno aperis Kvenĉjo, Platano kaj Aleĉjo, kiuj kantis kune la tradukitan version de *La vie s'écoule, la vie s'enfuit* (Vivo fluas, vivo fuĝas).



Sabato estis la lasta programtago de FESTO antaŭ la dimanĉa adiaŭo kaj disiro. Kaj aldoniĝis pluraj personoj, kiuj venis vendrede por ĝui la etoson de la du lastaj FESTO-tagoj.

La vespero ekis per hiphopa spektaklo de Platano kiu repadis kantojn el la Pafklika epoko kaj novajn kantojn el sia plej nova disko *Semoj*. La repado fluis laŭ hiphopaj ritmoj, kaj dum la koncerto aperis gaste Omar el Senegalio kaj Jonny M.



Sekve Jonny M komencis sian regean koncerton kun DJ Leo ĉe la muzikmiksado. Tiu koncerto prezentis lian novan albumon

Regestilo kaj ĉarmegis la partoprenantaron, kiu kune kun li kantis la rekantaĵojn kaj kelkfoje la tutajn kantojn... Post la sukcesega koncerto de Jonny M, DJ Leo daŭrigis per diskejo dum la lasta FESTA nokto.

Estis bonega festivalo! Homoj alte taksis ĝin kaj estis feliĉaj pro bonaj kondiĉoj kaj programeroj. Ĉiuj plenĝuis la tuton kaj ĉefe la etoson, en kiu miksiĝis en internacia miksaĵo ankaŭ intergeneracia partoprenantaro... Sed tie ĉiuj estis mense junaj!!!

Françoise kaj Flo!

Papere: La Ondo de Esperanto, 2013, №10.

Retete: *La Balta Ondo*

<http://sezonoj.ru/2013/09/228festoj/>

La Balta Ondo

Son-libro: La aventuroj de Alicio en Mirlando (Lewis Carroll)

La aventuroj de Alicio en Mirlando (angle Alice's Adventures in Wonderland) estas verko de porinfana literaturo de la brita matematikisto kaj verkisto, pastro Charles Lutwidge Dodgson sub plumnomo Lewis Carroll. Ĝi rakontas la historion de knabino nomata Alice [elis] (en esperantlingvaj tradukoj aŭ Alicio, aŭ Alico) kiu falas tra kuniklotruon en fantazian regnon populitan per parolantaj kreaĵoj kaj antropomorfaj ludkartoj. La fabelo estas plenplena de satiraj alludoj al la amikoj de Dodgson kaj al la lecionojn, kiujn la britaj lernantoj devis parkerigi. La Mirlando priskribita en la fabelo ludas kun logiko en maniero tiom speciala, ke ĝi donis al la rakonto longdaŭran popularecon inter infanoj kaj ankaŭ plenkreskuloj.



sonregistraĵo de
Nicholas James Bridgewater



<http://www.booksshouldbefree.com/book/Aventuroj-de-Alicio-en-Mirlando>

<http://novajhoj.weebly.com/son-libroj-en-esperanto.html>

Voĉoj de la Tempo Eduardo Galeano



La vortoj

En la ĝangalo de Alta Paranao, kamionisto rekomendis al mi esti prudenta :

- Atentu la sovaĝulojn. Estas ankoraŭ kelkaj da ili en libereco ĉi tie. Bonŝance ne multaj. Oni komencis enfermi ilin en bestĝardenoj.

Li parolis al mi en la hispana. Sed tiu ne estis la lingvo kiun li parolis ĉiutage. La kamionisto parolis la ĝuaranian, la lingvon de ĝuste tiuj sovaĝuloj, kiujn li timis kaj malestimis.

Strange, en Paragvajo oni parolas la lingvon de la venkitoj.

Eĉ pli strange, la venkitoj kredas, daŭre kredas, ke la vortoj estas sanktaj. La vortoj, kiu mensogas, ofendas tion kion ili nomas, sed tiuj, kiu diras vere, rivelas la animon de la aĵoj. La venkitoj asertas, ke la animo sidas en la vortoj kiuj diras ĝin. Se mi donas al vi miajn vortojn, mi donas min. La lingvo ne estas rubejo.

Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'



SLOVENIO

(17->18/4/2009 - 32 km => 2749 km)

▷ Ni alvenas en Slovenio komence de la vespero, Ni biciklis la tutan tagon en Italio kaj, post 80 km, ni fine transiras la landlimon sur netegita bicikla pado. Ni renkontas multajn italojn kurantajn, montbiciklantajn aŭ simple promenantajn kun sia hundo de iu lando al la alia.

Je noktiĝo ni dormas nur unu kilometron post la limo. Ni starigas nian tendon en kampo kie divineblas la formo de granda postveturilo. Cirilo taksas, ke ĝi entenas buntan aron da kestoj similaj al amasloĝejoj por kolomboj. Nur la morgaŭon en la mateno Roz' rimarkos, ke fakte temas pri abelujoj. En la mallumo estis eraro pri la loĝantoj...

Laŭlonge de la vojo rimarkeblas la multnombraj rostiloj antaŭ la restoracioj. Ĉiu posedas la sian, ekstere, sur la klientara parkejo. La odoro ja instigas al tagmanĝa paŭzo.

Ni veturas kelkajn pliajn dekojn da kilometroj antaŭ ol ni atingas la kroatan landlimon sub

forta pluvo. Kompatema slovena doganisto donacas molajn gantojn el kaŭĉuko por anstataŭi la malfortikajn plastajn gantojn, kiujn ni trovis en benzinejo.

daŭrigota





Origamio

Parto 1 : Prezento



Hodiaŭ mi decidis komenci serion da artikoloj pri origamio. Kial origamio ? Ĉar ekde pluraj jaroj, estas unu el miaj plej grandaj pasioj.

Origamio estas ege interesa mondo, riĉa je diverseco. Pere de simpla kvadrato da papero kaj geometriaj leĝoj, ĉio estas kreebla. Ĉar tio ĝuste estas la vera originaleco de origamio : estas tiu neordinara miksaĵo inter matematiko kaj arto.

La origamio tiel kiel ni konas ĝin venas de la populara ĉina paperarto dum la dinastio Han (inter jaro -202 kaj 9). Tiu arto rapide estos alportita al Japanio de budaistaj monaĥoj. Ĝis 1950, origamio estis nur tradicia arto, kiel muziko havas tradiciajn kantojn. La gruo (birdo kiu simbolas pacon en japanio, ĉi-sube) estas unu el tiuj tradiciaj origamiaj modeloj.



Sed iam alvenis iu japano, Akira Yoshizawa (ĉi-sube), kiu remodernigis la arton. Li kreis multajn modelojn kiuj bildigas ĉefe bestojn, kaj li kreis novan «solfeĝon» por instrui al origamiemuloj kiel faldi ilin. Tiel aperis la unuaj origamiaj libroj.



Pli kaj pli, homoj interesiĝis, iĝis pli kaj pli internaciaj. Hodiaŭ, la plej famaj loĝas en Japanio, sed ankaŭ en Sudameriko, Usono, Francio. Kaj en la lasta jardeko, origamio nekredinde rapide kreskis en Vietnamio.



Unikorno - Román Díaz (Argentino)

Ĉiuj modeloj montritaj en tiu-ĉi paĝo havas komunan regulon : falditaj de unu kvadrato, sen uzi tondilon nek gluo.



Masko - Joel Cooper (Usono)

Titolaj fotoj : Cigno de Hoàng Tiến Quyết (Vietnamio), kaj Rano de Nicolas Terry (Francio)

Samy

<https://myspace.com/gaetanobxl>



**Aĉetu viajn biletojn nun !
18 €**

Koncerto de

GAETANO

**Centre Culturel d'Auderghem
Bld du Souverain 183/185
1160 Bruselo**

Informoj kaj bileto-aĉetoj ĉe EBG aŭ Nikolao
aktuala@esperantobruselo.org

Ĵaŭdon 19an de decembro je la 20h30

Gaetano Getch sukcese partoprenis FESTO-n en Kelmis ĉi-jare. Li verkas kaj komponas sian muzikon kaj ekde la eldono de sia unua KD, iĝas pli kaj pli fama. Akompanata kun siaj talentaj muzikistoj, sursceneje Gaetano impresas, kaptas la etoson, varmigas la spektantojn, ridigas nin, emociigas nin de la facilanimeco ĝis trehomara profundeco.

Gaetano subtenas Esperanton ...
Esperantuloj, ... Ni subtenu lin ! ;-))

